nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2022

## STIPENDIOJ POR LA KURSO DE UNED (ANKORAŬ EBLAS ALIĜI)

La Centro por Lingvoj de la Universitato de Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) ampleksigis la periodon por enskribiĝi en la kursoj, ankaŭ de Esperanto. La nova dato estas la **8a de novembro**.

Necesas varbi pli da lernantoj ĉar la ekzisto de tiuj kursoj tre gravas por la publika bildo de Esperanto. Bonvolu diskonigi la informon laŭeble plej, ekzemple al tiuj homoj kiuj ne povas adaptiĝi al la horaro de ĉeesta kurso, aŭ kiuj deziras oficialan universitatan agnoskon. La ĝenerala adreso por pliaj informoj aŭ por enskribiĝo estas http://www.cuid.uned.es.

Madrida Esperanto-Liceo (MEL) donos ĝis **4 stipendiojn** por la kurso al junuloj aĝantaj malpli ol 30 jarojn je la dato de la komenco de la kurso (oktobro la 25an). La kondiĉoj estas: sinanoci al MEL pri la peto de la stipendio nun, loĝi en Hispanio aŭ havi la hispanan ŝtatanecon (se loĝanta eksterlande), kaj trapasi sukcese la kurson. La kandidatoj devas aliĝi kaj pagi la kurson, kaj je la fino, se ili sukcesas trapasi ĝin, MEL pagos la kostojn de la kurso laŭ la montrenda fakturo de la studento. Bv. peti al madrid@esperanto.es.

La instruado de Esperanto komenciĝis en la lernojaro 2018-2019 danke al interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio kaj ĉi-jare renoviĝos por kvar pliaj jaroj. Ĝi estas gradigita laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro en kursoj A2 (baza) kaj B1 (meza). Instruado estas asinkrona kun skribitaj kaj surbendigitaj lernomaterialoj, sed eblas skribe interagi kun aliaj lernantoj en forumoj, kaj partopreni unumonatan horon da videokonferenco kun instruisto kaj aliaj lernantoj. Kiu ajn interesato rajtas aliĝi se li aŭ ŝi aĝas almenaŭ 16 jarojn, kaj ne necesas havi ian antaŭan diplomon, hispanan civitanecon aŭ loĝi en Hispanio, nur bazan legokomprenon de la hispana lingvo.

## MALBONA POLITIKO PRI ASOCIISMO

MEL estis invitita partopreni en la Foiro pri asociismo 2022, kiu okazos meze de novembro, fare de la madrida urbestraro. La partopreno estas senpaga kaj la urbestraro lotumis la budojn (estis limigita kvanto da budoj) inter la invititaj asocioj, kiuj sendis intereson por partopreni. MEL sendis peton por partopreni kaj kvankam ni ne atingis budon, ni atingis rajton fari prelegon. Nia surprizo alvenis kiam la urba registaro postulis de ni havi specialan asekuron por fari tiun unuhoran prelegon. Kompreneble, MEL ne partoprenos, ĉar tiu postulo signifas pagi por fari prelegon. MEL ne komprenas kiel la urbestraro volas instigi la asociismon kaj samtempe postulas nebezonatajn elspezojn al etaj asocioj kiel la nia.

## VIZITO AL LA VITRA MUZEO DE ALKORKONO

Kiel ni anoncis en pasinta bulteno, la 6an de oktobro MEL organizis kulturan viziton al interesa kaj tre nekonata muzeo: la Muzeo pri Arto en Vitro de Alkorkono (MAVA), kiu situas ĉe la kasteloj de San José de Valderas, en Alcorcón.



Gviditaj de Toño del Barrio, grupeto de esperantistoj kaj amikoj povis viziti tiun specialan muzeon kaj promenis en la ĉirkaŭaĵoj.

Se vi havas alian proponon pri kultura aktivaĵo kaj deziras proponi al viaj esperantistaj amikoj, kontaktu kun MEL.

## KOMENCIĜIS LA ĈEESTA KURSO EN LA MADRIDA SIDEJO

Kiel anoncite, en oktobro komenciĝis nova ĉeesta kurso de Esperanto, gvidata de Andy Hernández. Aliĝis ses homoj, kiuj daŭrigas la lecionojn ĉiusabate matene.

Se vi aŭ amiko interesiĝas pri tiaj ĉeestaj kursoj, bv kontakti kun la Liceo ĉe: madrid@esperanto.es.

## VIRTUALA KONGRESO DE UEA KAJ TEJO

Kvankam jam eblas kongresi ĉeeste, Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) organizas denove virtualan kongreson en tiu ĉi venonta monato. De la 24a ĝis la 27a de novembro 2022 okazos la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto (organizata de UEA) + Retoso (la reta evento de TEJO). Teknike prizorgas E@I.




La Virtuala Kongreso (VK) estas senpaga por individuaj membroj (IM) de UEA, kiuj aliĝos al ĝi ĝis la 18-a de novembro 2022. Se vi ankoraŭ ne estas IM de UEA, eblas samtempe aliĝi al UEA kaj al la VK per la aliĝilo ĉe: https://vk.esperanto.net.

Retoso estas la reta evento de TEJO organizita de junuloj kaj por junuloj. Ĝi donos al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per la interreto. Se vi ŝatas amuziĝi, ludi kvizojn, partopreni en prelegoj aŭ diskutrondoj, aŭ koncertumi: Retoso bonvenigas vin!

La 3-a VK + Retoso estos la plej granda reta evento de la jaro! Pliajn detalojn legu ĉe https://uea.org/gk/1070.

## SABATA RENDEVUO EN STRATO ESPERANTO

La kutima unuasabata rendevuo okazos la 5an de novembro, denove en la trinkejo O Miño, strato Esperanto, 2 (metrohaltejo Alsacia), ekde la 18,30. Aliro kaj babiltemoj estas liberaj. Pliaj informoj: https://eventaservo.org/e/NovembraRenkontoEnMadrido.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

Memoru ke meze de decembro oni kumemoras la Zamenhof-Tagon. Madrida Esperanto-Liceo kaj Fuenlabrada Esperanto-Ligo (FEL) jam komencis plani komunan agadon, eble en ties ĉi sidejo, en la semajnfino de la 10a-11a de decembro. Tamen, la decido ankoraŭ ne estas farita, do simple rezervu vian tempon. En venonta numero ni informos detale pri programo kaj aliaj cirkonstancoj.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com